# Esperigaj Komunikoj (EKO)

EKO 2020-07 sendita el Whangarei la 24an de februaro

## <AKTIVULO.NET> AKTUALIGITA

Ne tiom konata estas tiu retejo de UEA, kiu prezentas abundon da informoj, interalie por aktivaj agantoj. Tie vi trovos arkivon de la ducento da komunikoj en la serio EKO, ekde 2013. Jen valora informfonto por historiistoj. Pluse, aktualigita estas la nova sekcio pri <Landa Agado> per la konsisto de la Amerika Komisiono. Tie vi trovas ampleksan resumon pri la unuopaj landoj kun ajna Eo-agado, la konsiston de la komisionoj, laborplanoj, kaj plena listo de kontinentaj aŭ regionaj kongresoj. Inda je via vizito!

## <EDUKADO.NET> PROPONAS LIBERAJN STUDOJN

Katalin Kovats: Mi atentigas vin pri kolekto de kursmaterialoj, lecionoj, prelegoj, kiuj ĝis nun estis aperigitaj en la KLERIGEJO de edukado.net. Ĝi estas nia libera universitato, kiu bone funkcias jam de jardeko.

Ni havas specialajn, libere alireblajn kurs-seriojn, ekz. Pri Vjetnamio, https://edukado.net/klerigejo/7




Krome pri astrobiologio kaj interlingvistiko,

https://edukado.net/klerigejo/4?m=superrigardo

Kaj kiel instrui pri multkultureco de Eŭropo: https://edukado.net/klerigejo/13

**En la sekcio LIBERAJ STUDOJ**
https://edukado.net/klerigejo/10?m=superrigardo
estas apartaj kolektoj en subbranĉoj pri lingvistiko, medicino, kulturo, literaturo, movado, metodiko, lingvopolitiko, interkultura edukado. ktp.

Mi ĵus aldonis lecionon (tekston, sondosieron kaj teston pri Ostoporozo). https://edukado.net/klerigejo/10?m=superrigardo&id=35

Se iu studanto eniras la Liberajn Studojn, elŝutas materialojn jam aŭtomate registriĝas kiel uzanto kaj ricevas skemon pri la eblaj testoj. Laŭ la temoj videblas ĉeloj, en kiuj verdiĝas la sukcese solvitaj testoj, ruĝe la refarendaj kaj neŭtrale la neniam provitaj. Se iu solvas teston kaj ne plene sukcesas, la bonaj solvoj pri la malbone responditaj demandoj iros en mesaĝo al la koncernulo.

Mi stimulas vin ekkoni la eblon, eventuale disvastigi ĝin inter viaj studantoj kaj ĉefe peti vin kontribui per prelegoj, filmitaj / sonregistritaj, artikoloj ktp. Vi povas fariĝi ankaŭ kunredaktoro, do, vidi kiuj kiel reagis al viaj materialoj, kiel solvis la testojn.

Katalin Kovats

PS: ILEI kaj UEA apogas la agadon en <edukado.net>. La eduka kampo temas ne nur pri la subteno por kursoj, kiuj instruas Esperanton, sed egale grave, kiuj donas eblojn por la pluedukado de esperantistoj pri plej diversaj temoj.

## UNU LECIONO PRI ESPERANTO - ANGLA VERSIO

Jen ILEI arigis la plenan dokumentaron en la angla lingvo. Bonvolu viziti https://www.ilei.info/agado/projektoj.php

## KUBO INVITAS AL ALLOGA KONGRESO

Kuba Esperanto-Asocio invitas vin ĉeesti la jaran renkontiĝon de la kuba esperantistaro (KERo) , kiu okazos en la centra regiono de Kubo en la feriejo Arcoiris (Ĉielarko) en la provinco Villa Clara. La programo de nia tutlanda evento inkluzivas variajn kulturklerigajn erojn. La 8-a KERo okazos de 25 ĝis la 29a de marto 2020

La renkontiĝo tutlanda bonvenigos pli ol sepdekon da esperantistoj kubaj kaj eksterlandaj. La feriejo situas proksime de la urbo Santa Clara kaj estas ĉirkaŭata de natura pejzaĝo kun ebleco turismi en la urbo kaj viziti la monumenton kaj placon de Che Guevara.



Dum la 8-a KERo okazos  la 36-a Nacia Komitatkunsido, la plej grava jarkunveno kie aktivuloj kaj estraranoj de KEA decidas agadojn de la jaro. Okazos diversaj  kursoj por progresantoj kun eksterlanda instruisto, paroligaj sesioj, ekzamenoj de KEA, fakaj kunvenoj, artaj kaj distraj vesperoj. Ne maltrafu la okazon ĝui unikan etoson en bela   natura regiono, renkontiĝi, praktiki la lingvon kaj amikumi.

Bonvenon al la 8-a KERo!

Maritza Guttierez

vortoj: 520